

PRI KORESPONDADO

Esperanto estas forte ligita kun internacia korespondado, ĉar fakte ni ja lernas Esperanton por praktika uzado. Ne ĉiu E-isto povas veturi eksterlanden aŭ renkontigi kun eksterlandaj esperantistoj, do ni povas pere de korespondado krei interesajn kontaktojn, multon ekscii pri la vivo kaj kutimoj en aliaj landoj, interŝangi diversajn materialojn por konstati eksterlandajn samideanojn pri la atingoj en diversaj branĉoj fare de nia vasta multnacia sovetia popolo.

Ne estas sekrete, ke eksterlandanoj tre malmulte scias pri nia lando, aŭ ili estas misinformitaj. Dume, kiam nia Sovetia registaro faris multon per la reguligo de internaciaj rilatoj kaj batalas per la konstanta Faco sur nia terglobe, ankaŭ E-istoj povas multon fari per sia kolektiva aŭ persona korespondado.

Mi mem korespondas kun multaj landoj, same kiel aliaj anoj de Riga E-klubo. Mi havas sufiĉe ampleksan personan bibliotekon kun E-libroj, belajn kolektojn da bildkartoj kaj faldfolioj, turismajn prospektojn, filatele afrankitajn kovertojn, sed leteroj plivastigas miajn konojn pri diversaj landoj kaj popoloj, denis al mi multajn amikojn, kelkajn mi jam konas persone. La ricevitan materialon mi laŭeble uzas per niaj klubaj kunvenoj kaj ekspozicioj.

Jam kelkajn jarojn mi gvidas la Korespondan fakon de SEJMJ, sed la plej aktiva agado estas notita nur ĉi-jare, kiam junaj E-istoj pli ofte petas adresojn; la plej aktivaj el ili estas: T. Leskutova (Ivanovo), O. Štraler (Siktivker), V. Dimitrieva kaj V. Rjabinin (Tula), S. Aristarĥov (Tiŝvin) kaj aliaj.

Mi petas la klubestrojn kaj apartajn E-istojn sendi al mi adresmendojn, ĉar en mia dispozo estas adresoj el diversaj landoj, kaj temp'-post-tempo informi min pri la starigitaj kontaktoj.

S. Neillande,
estrino de la Koresponda fako

GRAVE: TERMINOLOGIA LABORO!

Aktuala nuntempe estas kompilado de rusa-Esperantaj terminaroj, ĉar tiu-ĉi laboro utilas ne nur por sovetiaj E-istoj (teknikistoj, medicinistoj, instruistoj...), sed ilia enfaka perfektigo. Ankaŭ gravan signifon la laboro havas por eksterlandaj samideanoj, kiuj bezonas rusan fakliteraturo.

En E-o oni pli precize esprimas la sencon. Bonege tion montras jena ekzemplo. Antaŭ du jaroj en Budapeŝto estis eldonita 5-lingva (inkluzive E-on) interpreta terminlibro pri kalkulmaŝinoj. En la verko pli precizan sencon esprimas la E-parte de la antaŭparolo kaj la terminaro mem. Sekve, la terminologia laboro en E-o internaciigas la multlingvan teknikan balbutadon.

Mi proponas organizi en kadro de la Scienc-teknika fako de SEJMJ terminaran sektion, kiu kreas konstantajn laborgrupojn, akupiĝantajn pri kompilado de fakaj rusa-Esperantaj terminoj kun konformaj difinoj. La laboro de TS-interesitoj helpes al la ŝtataj organizaĵoj en nia lando (scienc-teknika informado - ВНИИТИ, klasifikado de ter-

minologio - ВНИИКИ) kaj eksterlande (ISAE). La rezulto de la laboro instigos pri lallabe al revuoj de E-resumaro pri diversaj branĉoj de la scienco kaj tekniko. Per tio oni atingu multe pli vastan influon tra la landoj sendepende de la originala lingvo.

En la aldonita regularo mi mencias la samideanojn, kiuj povus gvidi koncernen terminologian laboron laŭ sia ŝatekupo aŭ specialeco. Estas dezirata sinprepono en aliaj branĉoj de la scienco kaj tekniko. De mi petas kritikon kaj disputon, reĉon kaj subtenon.

R e g u l a r o

de la Terminara sekcio ĉe la Scienc-teknika fako de SEJM
(projekte)

1. TS estas fondata por:
 - a) kolektado de fakterminoj jam ekzistantaj en Esperanto en mikrobenda formo por vasta uzo en terminara laboro;
 - b) kreo de konstantaj laborgrupoj, okupiĝantaj pri fakaj terminaroj kaj kunlaborantaj inter si;
 - c) kompilado de bibliografio de E-terminaroj por eventuala eldono;
 - d) kreo de SEJM-biblioteko de fakterminoj;
 - e) ordigo de la kolektita materialo, modernigo de malnovigintaj terminoj, ellaboro de terminovariantoj por novaj scienc-teknikaj vortoj kaj esprimoj;
 - f) prepare kaj eventuala eldono de fakaj rusa-Esperantaj terminaroj;
 - g) distribuo de la eldonitaj terminaroj inter interesigantaj samideanoj.
2. Ĉiu E-isto de Sovetio, deziranta labori en TS, sendu siajn donitaĵojn al la TS-estro kaj elektu por si ŝatatan branĉon aŭ proponu sian ŝatekupon (vd. la suplementon N^o1). Benvena estas kunlaboro de eksterlandaj samfakuloj.
3. La TS-estro estas elektata dum SEJM-Konferenco.
4. La laboron de TS la Scienc-teknika fako de SEJM gvidas.
5. TS en sia laboro uzas unuecan sistemon por registrado de fakterminoj (vd. la suplementon N^o2*).
6. TS establas kaj subtenas konstantan ligan kun la Terminologia centro de ISAE per reciproka kunlaboro kaj interhelpe.
7. TS esploras eblecojn por kontaktoj kaj kunlaboro kun ŝtataj terminologiaj centroj:
 - a) a) ВНИИТИ - Tutsovetia instituto pri scienc-teknika informado;
 - b) ВНИИКИ - Tutsovetia scienc-esplora instituto pri teknika informado, klasifikado kaj enkodigado.
8. TS-interesiĝantoj esploras eblecojn per kontakte kaj kunlaboro kun lokaj organizaĵoj pri scienc-teknikaj informado.
9. La rezultojn de la TS-laboro uzas la Tradukista, Radioamatora, Feta, Lumbilda kaj similaj fakoj de SEJM.
10. TS organizas metodikan kurson pri terminologia laboro en kadro de SEJT.
11. TS strebas al oficialigo de novaperintaj sovetiaj terminoj ĉe la Terminologia centro de ISAE kaj E-Akademio.

*La suplementoj N^o2 kaj N^o3 estos publikigitaj en unu el proksimaj numeroj de "Aktuale" (Red.).

Suplemento №1
 Laborplano de la Terminara sekcio ĉe ST-fako de SEJM
 (projekto)

NNN ^a	TS-labore	Plenum- periodo	Respon- decas	Remarkoj
1	2	3	4	5
I	Kreo de konstantaj laborgru- poj, okupigantaj pri fakaj ter- mineoj. Publikigo de listo de samfakuloj	Antaŭ SEJT-17	TS-estro	En "Aktuale"
II	Kompilado de bibliografio de E-terminaroj en elipoj	1975- 1977jj.	TS-interesi- ganto	Por SEJM- biblioteko
III	Kolektado de fakterminoj en mikrobenda formo	Konsta- nte	A. Kogan (Tifvin)	P " "
IV	Kreo de SEJM-biblioteko de fakterminaroj	Konsta- nte	TS-estro	" "
V	Registrado kaj oficialigo de novaperintaj sovetaj terminej ĉe la TC de ISAE kaj E-Akadem.	Konstante	ST-fakestr Kaj TS-estro	
VI	Esploro de eblecoj per kon- taktoj kun ВНИИКИ kaj ВНИИТИ	La 1-a duonjaro de 1 ^a -75	Moskva E-klubo	Medvedev, Vulfoviĉ
VII	Esploro de eblecoj per kon- taktoj kun lokaj organizaĵoj pri scienc-teknika informado	Antaŭ SEJT-17	TS-interesi- gantoj	
VIII	Organizo de metodika kurso pri terminologia labore en kadro de SEJT	Dum SEJT-17	ST-fakestr tro	
IX	Redaktado kaj eventuala el- dono de fakaj rusa-Esperantaj terminaroj	Konsta- nte	" " "	Post apero de eldon- eblecoj
X	Distribuo de eldonitaj ter- minaroj inter interesiĝantaj TS-anoj	" " "	TS-estro	
XI	Kompilado de fakaj termina- roj:			
	a) teknika pri veldado	1975-77	Gakalenko	Tifvin
	" " metalurgio	1975-77	Vulfoviĉ	Moskvo
	" " varmo	Estas ko- mpilita	I. Tuma	Brno (CSSR)
	" " gisado	1975-78	V. Ebel	Barnaul
	b) kemia pri organiko	Kompilita	A. Gonĉarev	Barnaul
	c) fizika pri ...	Kompilita	V. Miŝĉenko	Kiev
	d) medicina pri ...			
	e) matematika pri kompu- tiloj		G. Cejtin	Leningrad
	pri ...		V. Kulikov	Omsk
	pri ...		L. Goreva	Ivanovo
	f) cibernetika pedagogio	1975-78	IZUS-anoj (bezonas interesi- gantojn)	/14/ en la su- plemento №3*

*Vidu la piednoton sur p. 2.

Daŭrigo

1	2	3	4	5
XII	Preparo kaj publikigo de listo de fakterminaroj kaj literaturo, bezonata por terminologia laboro	Konstante	TS-estre	En "Aktuale". Suplemento №3
XIII	Preparo de suplemento al la E-rusa vortaro, kompilita de d-ro E.A.Bokarev	Dum la 1975-76	A.Kogan	Surbaze de la verko /9/

A.Kogan (Tiŭvin)

Esperanto-movado bazas sian agadon sur spertoj, postlasitaj de sindonaj aktivuloj. Post ni venos novaj epokoj, malsimilaj al tiuj, kiujn ni konas. La movado kaj la historio de ĝi ne estas afero de malnovaj veteranoj, eĉ ne SEJM mem, sed de la venontaj generacioj. La esplorado, studado de historio-spuroj kaj surpaperigo al la venontaj generacioj atestu pri nia sincereco. La indikoj (bibliografio) grandparte troviĝas ĉe la Historia fako de SEJM.

ESPERANTO EN RSFSR

T e m a r o

I. Antaŭrevolucia periodo

1. Zamenhof en Moskvo 1879-81jj. (Publikaĵo: "La Nova Epoko", 1929, n-ro 3(75), p. 58-68).
2. Samtempuloj de Zamenhof. (Generaligo de kontribuoj kaj publikaĵoj de V.Devjatkin, A.Nedeŝivin, A.Fiŝer, L.Iljaseviĉ, Jedalkin, G.Deŝkin, A.Sutkovej, A.Saŝarev, I.Lisiĉnik k.a. (1887-1914jj.).
3. E-biblioteko de G. Davidov en Saratov 1888-1937jj. (Materialoj: Saratova Regiona fundamenta Esp. biblioteko; "Sennaciulo", 1925, n-ro 33, p. 5-6; Enciklopedio de Esperanto, vol.1; katalogo de la biblioteko de G.Davidov I,II partoj, 1908, 1911j.).
4. L.Tolstoj. Zamenhof kaj Esperanto. (Publikaĵoj: F.I.Kolobanov, fragmento en "Esperanto" 1959, n-ro 12(649), p. 220-222).
5. Unuaj E-grupoj en Ruslando. (Apartaj artikoloj de L.Zamenhof en la ĉapitro "Leteroj" en "Verkaro de Zamenhof", p. 415-585; "La Esperantisto" 1889-1894jj.).
6. Esperanto-literaturo kaj gazetararo. (La eldonejo "Esperanto" en Moskvo 1909j.; "Espero" (ĉe la "Vestnik znanija"); "Ruslanda Esperantisto" en Peterburgo).
7. Esperanto kaj caza cenzuro. (Publikaĵo: S.Ĥverostin, "Unuigo", 1970, n-ro 3, p. 15-20 (nefinpublikigita, ĉar "U" ĉesis aperadi).

II. Postrevolucia periodo 1917-1937jj.

1. Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) - S.Podkaminer (Leningrad). (La prafontoj. III Kongreso de tutruslanda esperantistaro 1921j. Starigo de SEU. La sekvantaj kongresoj).
2. Kunagado de SEU rilate al SAT. - S.Podkaminer.
3. Problemo de la lingvo internacia. (Labore de la Lingva komisiono, Klopodoj de Komintern kaj Akademio de interlingvistiko).
4. Ido-"movado" en USSR.
5. Eldona agado kaj la gazetararo ("La Nova Epoko", SEU (kiel eldonejo), EKRELO, "Internacia Lingvo", "Internacisto", "Sur posteno").

6. Literaturo: a) originala, b) traduka - B.Tokorev(Moskvo).
7. Rolo de Esperanto en la ideologia edukado. (Disceligado de libera penso, batalado kontraŭ eklezio kaj obskuro).
8. Esperanto en lernejoj. (Instruado de la lingvo, pedagogia literaturo, lernolibroj).
9. Apogo al Esperanto de oficialaj instancoj kaj aŭtoritatuloj.
10. Helpe de E-istoj por la ŝtataj aferoj.
11. Rolo de E-o dum la malsatado en Ruslando 1921-1923jj.
12. Junulara esperantista movado. (E-sekcioj de komsojaj organizaĵoj. E-o kaj sporto. Internacia korespondado).
13. Esperantaj radio-elsendoj (ekde 1922 j.).
14. Internacia Huga Helpe (MOPR).
15. Froleta Esperantistkorespondado (PEK-organizaĵo).
16. Publikaĵoj de eksterlandaj E-istoj pri Sovetunio.
17. Sciencaj kaj popularsciencaj publikaĵoj.
18. Bibliografio de rusaj verkoj en E-o.
19. Rusa sekcio de LEA.
20. Biografiaj skizoj: 1) Ernest Drezen; 2) N. Ĥoŝlev; 3) Emil Izgur; 4) Eugeno Miĥalski; 5) V. Kolĉinski; 6) N. Nekrasov; 7) S. Rublov.
21. Esperanto kaj socialismo - S. Podkaminer.
22. Lenin kaj Esperanto (estas jam verkita) - S. Podkaminer.

J. Petrulis,
estro de la Historia fako

ESPERANTO EN LITOVIO

T e m a r o

"Diron oni neas, skribo ne pereas".
(Zamenhova proverbo)

Malgraŭ la aserto, ke "la internacia lingvo trairis sian stadion en Litovio" (M. Boulton "ZAMENHOF", p. 46), ankaŭ faktoj, ke la movado de frua periodo en Litovio "havas riĉan historion", la esplorkomuneco ĉe ni ĝisdate iras testudpaŝe. Tiam staton ni ne rajtas plu permesi al ni. La esplorkomuneco ni malstagnigu nun! La Historia fako de SEJM aktualigis jenajn temojn.

I. Cariŝma periodo 1887-1914 jj.

1. Zamenhof kaj Litovio. (Publikaĵoj: A. Dembrauskas. "D-ras L. Zamenhof", verko (litovlingve) "Užgese žiburiai", p. 443-448, Kaunas, 1930; revuo "Litova Stelo", 1937, n-ro 4(16), dediĉita al Zamenhof; prof. J. Dagys, teksto por prelego (manuskripto); J. Petrulis "Zamenhof en Veisiejai", "Heroldo de Esperanto", 1959. IV; 1, n-ro 6(1384); "Zamenhof kaj Litovio", "Amikeco", 1974, kajero 1-a; N. Maimon, "Al kiu apartenas Zamenhof?", rev. "Kontakto", 1973, n-ro 4, p. 13-17).
2. Unuaj E-istoj kaj Esperanto-grupoj en Litovio. (Materialoj: Unua lernolibro de E-o por litovoj "Mokintuve tarptautiškos de A. Dembrauskas, 1890; ĝia diskonigo fare de 1' kelportistoj dum abelica periodo; revuo "Espero", 1908j., n-roj 1-12; ĵurn. "Telegraf Zapadn. Kraja", 1905-1910; "Pirmieji esperantininkai" - "Horiz. de Sov. Litovio", 1971, n-ro 2 (1892-1910 jj.).
3. Esperanto en Vilnius. (Fontoj: E. Privat "Historio de la lingvo Esperanto", vol. 1, p. 56; rememoroj de K. Geršter, M. Berštejn (manuskriptoj) - 1892; 1907; 1940).
4. Esperanto-Societo en Kaunas. (Fontoj: ĵurn. "Telegraf Zapadn. Kraja", 1907-1914; revuo "Kevna Esperantisto", 1910-1914; protokoloj de la Societo (1909-1914).
5. "Dum la muzo mutis" (1914-1918).

II. Burĝa periodo 1919-1940 jj.

1. Litova Esperanto-Asocio. (Materialoj kaj fentoj: revuo "Litova Stele" de I, II, III periodoj; protokoloj kaj publikaĵoj pri kongresoj, konferencoj, kunsidoj; strukturo, statuto; eldonaĵoj).

2. Kontaktoj de litovaj E-istoj kun eksterlande. (Delegitaro de UEA; rilato al SAT, SEU, IPE, TEJO k.ct.; reprezentado en universalaĵ kongresoj; interrilato kaj kunagado kun E-organizaĵoj de najbaraj respublikoj; la interkorespondado).

3. Esperanto en Litova radio.

4. Esperanta kaj pri-Esperanta literaturo. (inkluzivu ankaŭ lernolibrojn kaj vortarojn).

5. La terĉujoj plej aktivaj:

Esperanto-societo en Siauliai;

Paneveja Esperanto-asocio;

E-societo "Verda kverko" en Dotnuva;

E-grupo en Radviliškis (aperigadis gazeton "Norda Stele");

E-grupo en Biržai (aperigadis revueton "Tagiĝo");

E-sekcio de "Kultūros būrelis" en la vilaĝo Rudikai, distr.

Kupiškis (aperigadis revueton "Pyvese-akordoj");

E-grupo de Ž.Naumiestis (aperigadis revueton "Unuaj paŝoj").

6. Biografiaj skizoj (pri mortintoj)

- | | |
|-------------------------------|------------------------------|
| 1. Alseika Liudas | 12. Naudžius Klemensas |
| 2. Butkus Vladas | 13. Medemas Paulius |
| 3. Cieška Ipolatas | 14. Opulekis Apolinaras |
| 4. Dambrauskas-Jakštas Aleks. | 15. Oželis-Kazlauskas Stasys |
| 5. Dūda Balys | 16. Petrulyte Marija |
| 6. Gaigalas Petras | 17. Prapuolenis Antanas |
| 7. Giedra Balys | 18. Robinzonas Merkas |
| 8. Grigas Napalys | 19. Sabalis Stasys |
| 9. Janickiene Emilija | 20. Tijiūnaitis Stasys |
| 10. Lapiene Petras | 21. Vidikauskas Kazys |
| 11. Mačernis Juozas | 22. Zilbernikas Aleksandras |

J. Petrulis,
estre de la Historia fakto

* * * * *

Kelkajn miajn opiniojn pri la artikolo de s-ano Gercikov. Mi ne analizos ĝin, nur skribos, kio min mirigis, en kio, laŭ mia opinio, eraras la aŭtoro. Li kelkfoje emfazas, ke ni pli vaste uzu la Zamenhofan Fundamenton, la zamenhofan stilon. Certe, neniu fervora E-isto eĉ "modernulo" kontraŭdiros. Sed kion fari, se estas bezono traduki en Esperanton scienc-teknikan literaturon? Ĉu ni rajtas anstataŭ "duraluminio" uzi "zamenhofan" "malmol-aluminio"? Unuavice ni devas utiligi internaciajn radikojn de teknikaj terminoj kaj radikojn de naciaj lingvoj, en kiuj unufoje aperis la koncerna termino. Fakte, Zamenhof mem konstruis Esperanton ĉi-kampe. Ekzemple, al ĉiu konata estas la termino "sputniko", kiu havas en la vortaro de E. Bokarev (eld. 1974 j.) unusignifan tradukon. Dank' al la scienc-teknika progreso en nia lando la vorto fariĝis internacia. Certe, pri ĝi ne sciis Zamenhof (temas pri la moderna senco de la termino), sed ĝi uzis en sia Fundamento "satelito", kaj tiu-ĉi vorto ricevis nuntempe duan sencan "urbo-satelito" (la aŭtoro mise uzas la adjektivan formon de "satelito" el Bokarev-vortaro kiel duan sencan de la vorto. Ennla vortaro estas "estabita urbo")*. Same aperas anglaj, francaj, germanaj ktp. terminoj, kvan-

*Rimarko de la Redakcio.

kam paralele progresas Esperantaj. La historio montros, kiuj estas pli esprimriĉaj. Ni ne devas kontraŭstari, sed male - subteni la proceson, riĉigi Esperanton!

A.Kogan (Tiŝvin)*

INSULTO NE ESTAS ARGUMENTO

R e p l i k o

En la 10-a numero de "Aktuale" aperis artikolo de G.Gercikov "Baseta maloldule;:.". celanta forigi neologismojn el la lingva praktiko de Esperanto. Lesante flanke la temon de tiu elpaŝo (kun espero, ke iu el la legantoj donos sobran respondon), mi volas atentigi pri ĝia tono.

Ni bone scias, ke opinioj pri tiu aŭ alia demando, eĉ vive grava, povas esti diversaj, kaj pro tio nature aperas inter ni disputoj, en kiuj naskiĝas la vero. Sed nepra antaŭkondiĉo de ĉiu disputo estas - estimi la oponenton. Ĉu videblas tio el la artikolo de G.Gercikov?

La aŭtoro en trea polemika verve tute ne bridas siajn emociojn. La esperantistoj, kiuj malsamopiniis kun li, estas nomataj "fikreuloj", kiuj "injektas venenon"; ilia agado estas taksata kiel "ponarda bato" kaj "aĉa afero". Ne mankas tiaj pitoreskaj parolturnoj kiel "malbena serpento", "abomena", "fikreaĵoj" ktp. Precepte malavare uzas G.Gercikov la vorton "aĉaĵoj". Eble la aŭtoro opinias, ke tiaj esprimoj estas signe de elekventeco kaj faras lian argumentadon pli konvinka? Sed fakte tia stilo donas nur malan efikon: ja kiu estas vere prava kaj sentas firmecon de sia pozicio, ne bezonas uzi insultaĵojn per pruvi sian pravecon.

Krome pri la alvoko "arde kaj senkompate batali". Volas tion la aŭtoro aŭ ne, ĝi minacas nin per skismo, sed ni bezonas antaŭ ĉio organizan unuecon! Al ni ĉiuj - kaj "konservativuloj", kaj "pliboniguloj" - estas karaj la lingvo, ĝia estonteco, perspektivoj de la Movado. De ni ne "versu sangon", sed montru estimon kaj toleremon unu al la alia - eĉ se tiu alia estas "herezulo".

Kaj, se reveni al la artikolo, ĝia neallaseble kruda tono estas malrespekta ne nur al la "ideaj malamikoj" de la aŭtoro, sed al la tuta legantaro. Nia bulteno ne estas strata barilo, sur kiu ĉiu povas skribi kion ajn, ne elektante esprimajn. De la estontaj aŭtoroj tenu sin en la limoj de ĝentileco, kaj la artikolo "Baseta maloldule..." restu la unua kaj la lasta escepto.

V.Areloviĉ,
prezidanto de SEJM

MALALTETA MALJUNULO MALGAJIS DUM MALSEKA MALAŬTUNO

Estimata redaktoro!

Mi plene subtenas vin pro la publikigo de la artikolo de k-do Gercikov. Ankaŭ mi flame subtenas la ideojn de k-do Gercikov, kiuj celas ekstermi ĉiun malpuraĵon el la fundamenta Esperanto. Same mi arde subtenas la saĝajn kaj utilegajn proponojn de A.Vajtilaviĉius, cititajn en la artikolo.

Tamen tutplene subtenante la ideojn de Gercikov-teoriulo, ni devas kondamni la reviziismon de Gercikov-aŭtoro, kiu uzas en sia artikolo aregon da aĉaj neologismoj kaj fikreitaĵoj senbezonaĵoj sine-

*La artikolo estas eltire el privata letero al la redaktoro de "Aktuale".

nimoj. Por ne esti nudverta mi citas la neologismajn fikreaĵojn el la artikolo de Gercikov, kaŭzitajn de lia "infana malsano de maldekstreco", kaj mi proponas purajn, fundamentajn enstataĵojn.

Evoluo - disvolvo; diskutanto - preparolanto; aŭtoro - verkin-
to; ofendo - malkareso; oponento - kontraŭdiranto; veteranoj - mal-
novuloj; solide - gravmiene; neŭtraleco - nenieseco; skismis - dis-
partiĝis; asertis - jesis; akceptos - alprenos; nekto - meltago;
donaciis - donis senpage aŭ simple-senpagis; titolanta - namanta;
sovaĝa - malhejma; fremda - malpropra; tragedio - malkomedio; su-
fikso - malprefikso; abomena - malbona; brusto - maldorso; gra-
nda - maleta; forgesu - malmemoru; logiko - malabsurdo; komenciĝa-
nta - malfiniĝanta; enkondukataj - enigataj; grava - malbagatela;
bremsi - malrapidigi; vivo - malmorto; ŝanĝoj - aliigoj; ne - mal-
jes; frenezejo - malsaĝulegejo; mankas - ne estas; injekti - enigi;
kondamnis - juĝaciis; persekutis - sekvaĉis; adeptoj - sekvantoj;
respondi - maldemandi; kuŝas - malstaras; traduko - alilingvigo;
rajtas - permesatas; krei - fari; stabileco - starantece; revizi-
istoj - aliigistoj; ripeti - rediri; saĝa - malstulta; agnoski -
rekonii; bojkoti - malrekonii; amase - are; centprocente - centcent-
one; sinonimoj - samsignifaĵoj; Gercikov - mal-Kaloesay, Talgar -
mal-Tokio.

Pereis la malbenita latino, sed vivas kaj prosperas ĝiaj idoj -
la hispana, franca, kazaĥa lingvoj! Provu enigi en ilin "mal"-ver-
tojn, kaj oni deklaras vin esperantisto.

El ĉio ĉi-tie ĉi-tie dirita mi tiras jenajn konkludojn kaj pos-
tulojn, bazante min sur la saĝaj kaj utilegaj proponoj de A.Vajti-
lavičius:

1) ne agnoski kaj bojkoti fikreitajn vertojn de k-do Gercikov,
cititajn supre; anstataŭ la aĉa titolo de la artikolo de k-do Ge-
rcikov uzi la titolon de mia artikolo;

2) bojkoti (ne aboni) "Aktuale" pro tio, ke ĝi permesas al k-do
Gercikov amase uzadi tiajn neologismajn aĉaĵojn sur la paĝoj de nia
ŝatata informilo;

3) perletere esprimi al la redakcio de "Aktuale" kaj al la SEJM-
konsilantaro indignon pri malpurigo de nia kara verda lingvo;

4) postuli de la Akademio de Esperanto oficiale ferigi kaj mal-
permesi uzadon de centprocente senbezonaĵaj sinonimoj kaj anstataŭ-
igi ilin per normalaj, puraj, Fundamentaj vertoj, ekzemple: aŭto-
mobilo - malĉevalo, piedo - malmano, kato - malhundo, knabino -
malknabo, direktoro - mallaberisto, poeto - malprozisto, historio -
malnuno, julio - maljanuaro, akvo - malbrando, krokodilo - males-
perantisto, longa - malmallonga, lernante - malinstruisto, verte -
malfraze, ĵurnalo - mallibro, blanka - malnigra, ĉio - malnenio,
vilaĝo - malurbo ktp.;

5) malpermesi uzadon de E-rusa vortaro de Bokarev, ĉar ĝi en-
havas mortige aĉajn; fiajn, ponarde serpentajn vertojn kiel, ek-
zemple: artemizio, baranko, cervelase, ĉiĉerono, demarŝo, ekarto,
flikteno, gango, ĝeto, haĉi, impeto, jeto, jamboreo, kajako, li-
vida, mopedo, nupto, obeza, puea, ronroni, skipo, ŝanelo, tajgo,
uzuro, vakero, zipo, kaj milojn da aliaj. Vere, mi dume ne scias,
per kiuj "mal"-vertoj ilin anstataŭigi, sed, se la tuta SEJM pen-
sas pri tio la tutan jaron, ni, certe, malgrandigos la E-rusan ver-
taron de Bokarev ĝis 157 radikaj vertoj, kaj nia kara lingvo fari-
ĝos lernebla dum 3 tagoj kaj duono, kaj tial ĝi venkos kaj prospe-
ros. Vivu la stel'!

Malmalmalulo

POST UNU LABORJARO

Klajpeda E-klubo funkcias de la 1968 jaro. Malmultaj scias pri ĝi, pro tio la nova kluba konsilantaro decidis konstante informi Sovetian E-istaron pri nia kluba agado.

La 6-an de oktobro ĉi-jare okazis ĝenerala jarkunveno de Klajpeda E-klubo, dum kiu evidentigis la stato de la klubo. La tagordo de la kunveno estis riĉa kaj varia. Post la malfermo de la kunveno, sekvis raporto de la kluba estraro. Nia klubo la pasintan laborjaron agis laŭ antaŭvidita plano. La laboron gvidis 10-persona kluba konsilantaro. Unu el la plej gravaj pasintjaraj aranĝoj estis "Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj", kiun vizitis ĉ. 3000 urbanoj. La sukceso de la ekspozicio estis taksita per dankesprimej, kiujn skribis vizitantoj en la libron de reĉoj, kaj deziroj ekvidi similan estonte. Bone funkciis la E-fakultate ĉe popola universitato, kies 4 filiojn (komencantan, progresantan, kaj nacilingvan primovadan) finis sume 54 personoj. Okazis la tradicia "Giruliai"-tendaro, kiun partoprenis 102 personoj. En ĝin estas enkondukita unu novaĵo - gaja ceremonio, kiu el la tuta programo plej multe plaĉis al la partoprenintoj, - akcepto de novaj membroj. Tia "akcepto" devus fariĝi tradicia. Ankaŭ bone pasis la abonkampanjo de periodaĵoj. Laŭdindan laboron faris nia bibliotekistino Z. Lapšienyte, ŝi pretigis bibliografion de pri-Esperantaj gazetartikoloj kaj de la klubaj E-libroj. En la urba gazeto dum la pasinta laborjaro aperis 15 sciigoj, 3 artikoloj kaj 1 fotoĵo pri agado de nia klubo. En la klubo konstante funkcias E-butiko, en kiu oni povas aĉeti multajn E-aĵojn. Por la jarkunveno en la klubejo estis faritaj interesaj standoj: "GDR-25", "La VI SEJM-Konferenco", "SEJT-16" kaj "Giruliai-74".

Malgraŭ, ke dum la SEJM-Konferenco nia laboro estis taksita per la tria loko, tamen en nia laboro estas multaj mankoj kaj malfacilaĵoj. Niaj klubanoj ankaŭ konsilantaranoj ne emas skribadi pri diversaj novaĵoj en la klubo kaj en la lando, ne partoprenas diversajn konkursojn. Ankaŭ ne ĉiuj klubanoj korespondas, abonas revuojn, regule pagas membrekotizen, partoprenas aranĝojn de la klubo. Kvankam en la klubo estas 112 membroj, tamen pli malpli aktivaj estas nur ĉ. 40; Nun absolute neniu tradukas, sed traduki endas multon. Kelkaj konsilantaranoj preskaŭ aŭ tute ne laboris. Tio ankaŭ ege malfaciligis la laboron de la ceteraj kaj rimarkeble malfaciligis la nivelon de la kluba laboro.

Nia klubo kunlaboras kun E-klubo de ĝemelurboj Debrecen (Hungario); Berlin, Rostock, Leipzig (GDR), Vsetin (ĈSSR), Sofio (Bulgario), tamen nuntempe la kunlaboro malplifortigas. La klubo havas ligojn kun multaj kluboj de Sovetunio kaj eksterlande. Entute nia klubo havas ĉ. 50 ligojn kun E-klubo, redakcioj kaj apartaj personoj.

Dum la kunveno la laboro de la konsilantaro estis forte kritikita. Precipe oni kritikis la kunvenojn kun antaŭe ne preparita programo, dum kiuj la homoj nur enuas, kaj ofte sekventfoje multaj jam ne venas. Kvankam per plej multe da voĉoj la laboro de la konsilantaro estis taksita bone, tamen mi ĝin taksus nur kontentige, ĉar la konsilantaro povis labori multe pli bone.

La partoprenintoj eldiris multajn valorajn proponojn por la nova laborjaro. Estis proponite krei plurajn fakojn, prepari laborplanon por la tuta jaro aŭ almenaŭ por duono, skribi en E-gazetaron, la estraranoj ne faru ĉion mem, sed donu taskojn al aliaj klubanoj, kaj multaj aliaj proponoj. Peste estis decidite organizi fakultaton pri E-movado, kursojn per komencantoj kaj progresantoj, labori laŭ fakoj, al ĉiuj klubanoj doni taskojn, komisi al klubano kolekti materialon pri iu lando kaj tien proponi laŭeble al multaj, dufoje dum monato organizi kunvenojn kun antaŭplanita tagordo.

Estis elektita konsilantaro: Skirutyte Levita - prezidanto, Bil-
kštys Juozas - vicprezidanto, Baniulaitis Vikteras - respondeca
sekretario, Kekiuotis Rimantas - sekretario pri internaj aferoj
kaj aliaj personoj. Entute 11 homoj.

Post la kunveno sekvis vesperaj impresoj. Krom multaj fotoj
estis demonstritaj lumbildoj pri E-tendaroj kaj du filmoj pri nia
kluba vivo.

La unua kunveno de la konsilantaro decidis fendi ses fakojn:
a)tradukistan kaj informan; b)prelegistan; c)bibliotekan kaj bib-
liografian, d)kantan kaj muzikan; e)klube-historian; f)kollektio-
fakon.

La kluba laborjaro komenciĝis bone. Oni esperu, ke la nova kon-
silantaro ne perdos sian entuziasmon, kaj la kluba agado plivigli-
ĝos plu.

Rimantas Keliuotis (Klaipeda)

KIEL NI VIVAS KAJ AGAS

Kelkaj epizodoj el la vivo de Ufa E-klubo

Enketaj turmentoj

Nia grupo revenis el SEJT-16 entuziasmeplena kaj preta labore-
gi. Ankorau en aŭgusto komenciĝis niaj turmentoj, kaŭzitaj de soci-
ologiaj enketoj, kiujn ni alportis el la tendaro. Inter ni ne est-
as profesiaj sociologoj - de ni turnis kaj returnadis ĉiujn 99
enketojn, kunmetadis ilin depende de aĝo, E-staĝo, sekso, familia
stato ktp. Tio daŭris du monatojn. En oktobro ni sendis finfine al
"Aktuale" la unuan parton de niaj esploroj. Sed la fine ankorau ne
videblas - ni kalkulas kaj rekalkulas, penas trovi ligejn inter
la ekzisto de E-klubo en urbo kaj la sekso de la respondanto ktp.,
kaj baldaŭ estimata redaktoro de "Aktuale" ricevos la duan pakajon
kun ciferoj

Konatiĝu- niaj novaj estroj

La 4-an de septembro en nia klubo okazis ĝenerala kunveno, ĝin
partoprenis pli ol 40 homoj. Dum ĉi-kunveno ni elektis novan klu-
ban estraron: prezidanto de la klubo iĝis Galina Fomenko, la est-
raron ankaŭ eniris la 1-a sekretario de rajkomo de komsomolo, gek-
kdoj B.Kolker, N.Cvileneva, S.Vaŝitova (sekretario), V.Golencova
kaj Jenikejeva (kasaj kaj abonaj aferoj). Niajn gratulojn kaj bon-
dezirojn!

E-lernolibro - finfine!

La plej grava evento estis, kompreneble, la apero de la lerno-
libro de B.G.Kolker. Kiu pensas, ke facile estis ĝin aperigi, -
nenion komprenas en E-aferoj. Rigardu la paperon de ĉi-libro. Vi
pensas, ke tio estas ordinara papero, ĉu? Tute ne. Kiam Boris Gri-
gorjeviĉ esploris ankorau la aperigobleciojn de la libro, oni res-
pondadis al li: "Necesas tre multe da papero. Trovi ĝin ne eblas."
Sed li trovis: kaj forŝtelis, kaj farportis sur siaj ŝultroj "etan"
rulaĵon da papero, kiu pezis pli ol 300 kilogramojn! De tuŝu ĉi-
paperon kun estimi. Kompreneble, papero - tio estis nur unu kaj ne
la ĉefa flanko de la afero. Pri aliaj flankoj povas rakonti nur
Boris Grigorjeviĉ mem, ĉar simplaj mortuloj ne kapablas kompreni
ĉi-"kuirejon".

Nun en nia klubo restas ankorau ioma kvanto da lernolibroj (iuj
klubo de SEJM ne mendis ĝis nun la rezervitan por ili kvanton) -
do, aliaj kluboj, skribu, eble ni sukcesos kontentigi viajn petojn.

Rondoj, rondetoj, rondegoj

- D De komenco de la lernejaro en Ufa ekfunkciis 9 E-rondetoj:
- ĉe la respublika biblioteko - gvidas A.Silantjeva, vizitas dumme 35 personoj (la artikolo venis fine de novembro, tial la nuna kvanto povas esti alia - Red.);
 - ĉe la Palaco de motorkonstruistoj - gvidas R.Jegoreva, vizitas 35 homoj;
 - en la universitato - gvidas T.Popova, vizitas 18 homoj;
 - en la 52-a lernejo (20 homoj) - V.Golencova;
 - en la geofizika instituto (8 homoj) - V.Gadejeva;
 - en la 1-a lernejo-internato - O.Manjušina, vizitas 6 homoj;
 - en la 108-a lernejo - R.Aĥmadullina;
 - en Sovetskij-rajkomo de komsomolo - ankaŭ R.Aĥmadullina;
 - en la aviada instituto - V.Manin; vizitas 35 homoj.

De se almenaŭ duono da kursanoj finos la kursojn, ni havos proksimume 80-90 novajn E-istojn.

Krom tio, Nina Cvileneva gvidas tradukistan rondeton per klubanoj, ĝi funkcias ĉiumerkrede.

Dum klubaj kunvenoj

Dum klubaj kunvenoj ni plejparte ... kalkulas monon. Jes, por abonado, por biletoj en teatron, por lernolibroj, por novaj E-insignoj, por veturado al Salavat al la novembra renkontiĝo, por re-aj biletoj ktp. Inter kalkulado ni sukcesas ankaŭ rigardi E-gazetaron, leterojn el aliaj urboj kaj aliaj landoj, solvas diversajn kurantajn problemojn kaj aŭskultas prelegojn. Prelegas ĉiu klubano laŭvice. Dume, ŝajnas, la plej interesa prelego estis tiu de N.Cvileneva, kiu rakontis pri E-literaturo kaj alvokis nin ĉiujn skribi romanojn kaj versojn en Esperanto por altigi la nivelon de E-literaturo. De atendu baldaŭ la rezultojn.

Informas N.Korĵenevskaja (Ufa)

NE FORGESU: "MUZO" OKAZAS ĈIUJARE!

La 5-6-an de oktobro sur insulo de la lago Vilnoja (apud Vilnius) okazis la sesa tradicia E-literatura aŭtuno "Muze-74". Ĝi estis organizita por popularigi originalan E-literaturon, novajn kantojn, por ekinteresi homojn per plenumado. Kaj nun mi diras: tion ni sukcesis atingi. Entute al Esperantujo venis 26 personoj kaj 6 (bedaŭrinde nur 6) partoprenis foreste. Ni havis gastojn el Kaunas, Siauliai, Liepaja, Tallin, Kolonna, Anykščiai.

"Muze-74" konsistis el kelkaj partoj: konkursa, labora kaj gaja. Okazis 2 konkursejoj de aŭtoroj (poezia kaj kanta) kaj 4 konkursejoj de plenumantoj (deklamantoj, legistoj, rakontistoj kaj kantistoj). Krom tio okazis ne anoncita (sed antaŭvidita) konkurse-surprizo: la muzanoj dum duonhora devis trovi sur la insulo naturan suveniron kaj rakonti historion, ligitan kun ĝi.

Ni laboris nur matene, kiam la kapo estis ankoraŭ freŝa. Antaŭ la konkursejoj okazis tradukpraktiko. Ni tradukis diversspece: intermite, sinkrone kaj legis tekston Esperante, vidante la nacilingvan tekston. Dimanĉe preskaŭ du horojn ni lernis E-kantojn novajn.

La gaja parte okazis sabate vespere, kiam finiĝis la konkursejoj, kaj ni ĝisnoktmeze kantis, ludis, rakontis anekdotojn kaj verajn historiojn. Samideano K.Pill el Tallin rakontis pri la atingoj de estonoj en libroeldonado, respondis al demandoj pri la junulara movado en Estonio.

"Muze" daŭris en tre bonaj kondiĉoj: forestis krokodiloj, ne estis tro granda kvanto da partoprenantoj.

Ni kore dankas s-anon I.Grul, kiu alsendis denace libron al la gajninto en la deklama konkurso. Ni ankaŭ dankas al ĉiuj, kiuj gratulis poŝtkarte muzanojn.

V.Bingelis ("Juneco", Vilnius)

I n f o r m o j * A n o n c o j * P e t o j * S c i i g o j
aldone al la kompanjo "Eldonejoj"

Ni esperas, ke SEJM-anoj jam komencis aktivan partoprenon en la kompanjo "Eldonejoj". Tamen bonvolu atenti jenon:

1. La enhavon de interesaj reagoj de oficialaj instanceoj bonvolu rapide sciigi ĉu al la SEJM-prezidanto V.Areloviĉ, ĉu al la komisiito pri specialaj taskoj B.Kolker.
2. Ĉiujn respondojn de la instanceoj komprenu al la SEJM-Konferenco. En okazo de via nealveno ĝustatempĉ transsendu ilin al unu el la supremenciitaj personejoj.

* * * * *

S-ano Buŝokas Konstantinas informas, ke en la urbo MAŜEIKIAI (Majejkaj) estas 120 gramofondiskoj "Litovaj estradaj kantoj en Esperanto". La prezo de unu disko estas 2 rb. 15 k. K-do Buŝokas preta sendi laŭ interkonsento la sendiskojn al dezirantoj.

Skribu-mendu laŭ adreso:

235500 Maŝeikiai, str. Valiuno, 9, Buŝokas Konstantinas.

* * * * *

K o r e k t o: en "A"-9(13) en la artikolo "La festivalo "SUDUVA-74"(p. 82) estas demaĝa eraro. Anstataŭ "Liepaja (Litovio)" legu "Liepaja (Latvio)". La Redakcio petas pardonon de la aŭtoro pro la eraro.

* * * * *

Dum la 59-a Kongreso de UEA en Hamburgo la 28.7.74 okazis la 2-a laborkonferenco de ILNS (Interlingvistiko ka lingvocibernetiko). De Sovetio ĉeestis d-ro M.I.Isaev. Materialej de la 1-a, 2-a, 3-a laborkonferencoj de ILUS kaj prospekto "Robimat II - Kybernet" (pri cibernetika pedagogio) estas mikrobendigitaj. Interesitoj povas peti ilin laŭ adreso: 187506 Tiŝvin, Leningradskoj obl., 3 Mikrorajon, 34, 34, Kogan Aleksandr, aŭ peti rekte laŭ adreso:

Bŭro Paderborn, E.U.R.O. Lehrtechnik, D-479, Paderborn, Riemekestr. 62; FRG;

Bŭro Paris: c/o Novarin S.A. F-75009, Paris 4, rue Frĉmenti, Fr.; F-94100 St Maur des Fossĉs 44, r. Garibaldi, Fr..

Krom tio estas mikrobendigita aktuala informo "Esperanto en lernejo kaj universitato" en Okcidenta Eŭrope, en kiu temas pri 3-jara instru eksperimento en lernejoj kaj universitatoj de kelkaj Okcident-Eŭropaj landoj.

A.Kogan (Tiŝvin)

D E Z I R A S K O R E S P O N D I

1. Kursanoj. Bv. skribi al la kursgvidanto: Georgi Simeonov, ul. K.Jordanov 15, VIDIN, Bulgario.
2. E-klubo "Verda Ministe", Dĉm gornika NSIII, Ruda Slaska-7, ul. Oswiecimiska 60, woj. Katowice, Pollando.
3. Rudolfo Canet, str. Quintana, 12-13, ALICANTE, Hispanio.
4. Komencantoj el Pedagogia Altlernejo: Adreso: Ryszard Dolinski, ul. Asnyka 6/13, PL-RZESZOW, Pollando.
5. J.Strĉnne, Amiralsgatan 36, S-21155 MALMĉ, Svedio.
6. Stanĉo Marinov (25-jara), LOVEĉ, Zavod "Balkan", Ceh-25, Bulg. S.Neillande, estrino de la Koresponda fako